Laborplano-2022 de IKEF

En la jaro 2022 IKEF planas siajn agadojn tiel ke:

1) Kunvenoj:
    a. Regulaj DK-oj ĉiudimanĉe;
    b. Sezona Kunveno, 26 junio;
    c. Movada Foiro kaj Fakkunsidoj dum la UK en Montrealo, aŭguste;
    d. AMO-Seminario, 25 septembro;
    e. 10a Azia-Oceania Kongreso, oktobre;
    f. Konferenco de IKEF, 25-26 decembro;
2) Akademia agado:
    a. Lanĉo de distanca instruado pri komerco, ekonomiko kaj entreprenado (regularoj pri la instruado; studkampoj: enkonduko de ekonomiko; administrado de la internacia komerco; etiko de komerco; studplanoj /listo de la lecionoj, lekciaj kaj praktikaj studhoroj laŭ semestroj/, programoj de la lecionoj, diplomoj pri la studoj);
    b. Eldonado pri komerco, ekonomiko, terminologio ktp;
3) Faka agado:
    a. Turismo: Lanĉo de aplika sistemo de turismo (entreprena, histori-kultura, natura ktp), kontaktadresaro de la interesiĝantoj kaj vojaĝagentejoj, funkciigo de retpaĝo pri turismaj informoj;
    b. Regulaj kunvenoj ĉiusemajne kun prelegoj kaj prezentoj pri turismaj temoj;
4) Administraj laboroj:
    a. Sekretariado (informado, retpaĝaro, ĉiutagaj kontaktoj kun la koncernatoj, Gvidlibro de IKEF,)
    b. Dokumentado (lokigi virtuale malnovajn kaj ĝisdatigitajn dokumentojn de IKEF en formatoj Word kaj PDF)

c. Membraro (ĝisdatigo de listo de la membroj kaj kotizado)

d. Kasaj laboroj (bilancoj laŭ jaroj).